# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 9 F C.C.P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1979 — N° 72


## 23-a de Septembro en SETE

*AUTUNA KUNVENO DE LA FEDERACIA KOMITATO*

Dudeko da gesamideanoj,inter kiuj 10 federaciaj komitatanoj,partoprenis en nia federacia aŭtuna kunveno ĉe "Centre Familial du Lazaret".

Je la 10-a S-ro Llech-Walter malfermis la kunvenon.

D-ino Vierne sciigis pri la subita elmondiĝo de F-ino Hortelan,prezidantino de la grupo de Montpellier,ĝuste en tiu ĉi domo, la 18-an de septembro. Dum unu minuto ni stare silente salutis la memoron de nia forpasinta samideanino.

D-ino Vierne raportetis pri la finiĝinta "Mediteranea E- semajno" kiu ankaŭ tie okazis. Aliĝis 33 homoj kaj venis 28 de Lille ĝis St Gaudens,de Nantes ĝis Toulon. Tiu "semajno" celis kunvenigi kaj paroligi homojn en samideano etoso.

Sekve de renovigo de triono de la federacia komitato dum la printempa kongreso de Montpellier kaj post konsento de la antaŭaj postenuloj kaj de la ĉeestantaj komitatanoj, la federaciaj estraro kaj komitato estis sensanĝe reelektitaj.Dum la venontjara federacia kongreso ni devos provizi 5 federaciajn postenojn,nome tiujn de Ges-roj Angevin,Authier,Coquin (ne rekandidatiĝas) Terral kaj Amouroux.

La abono 1980 por "Sudfrancia Stelo" estos naŭfranka. Ni ne ankoraŭ konas la kotiztarifojn 1980 por U.E.A. & U.F.E.

Laŭ pete de S-ro Texier,Prezidanto de U.E.F.,S-ro Amouroux,rediris la demandon de U.F.E. : "ĉu utilus,ke U.F.E. kreu helpo-servon profite al selektitaj bonaj lernantoj ? " Dum la lasta nacia kongreso en Lille, la nacia komitato komisiis S-ron Amouroux demandi al diversaj grupoj pri spertoj koncerne helpon al bonaj lernantoj. Laŭ la ricevitaj respondoj de la grupoj de la federacio kaj de alifederaciaj viglaj grupoj absolute neeblas decidi pri efiko kaj utilo de tia helpo. Evidentiĝas,ke nur post prikonsidero de multaj kriterioj,U.F.E. povos mem decidi ĉiufoje kiam individua helpopeto sin prezentos al ĝi.

S-ro Llech-Walter ricevis leteron de U.E.F. petante ĉu la venontjara landa kongreso povos okazi ĉu en Perpignan,ĉu en la federacio. Li klarigis ke en 1963 li spertis tre gravajn kaj malfacile solveblajn problemojn pri loĝado. Ja en Perpignan,kaj cetere en plejparto de urboj de la mediteranea marbordo,ekde la printempo,estas malfacile kontentige solvi loĝdemandojn pro lokaj eventoj kiuj ofte havas tutlandan aŭ internacian reeĥon : "Sankta Semajno" en Perpignan,"Ferio" en Béziers kaj Nîmes,ktp...Respondo al la demando de U.F.E. estas resendita al la posttagmezo.

S-ro Lentaigne prezentis sian baldaŭ aperontan tre valoran kaj utilan kompiladon : "Kiel diri....?" ( praktika esperanta frazeoligio).

Je la 12-a finiĝis la unua parto de la kunveno kaj,post la komuna tagmanĝo, je la 14-a, ni rekunsidis.

S-ro Légros el Lille donis siajn impresojn pri la organizo de la ĉi-jara landa kongreso en Lille.

Estis precipe antaŭvidite,ke la venontjara landa kongreso povus okazi en SETE de la 24-a ĝis la 26-a de majo ( Pentekosto) sed findecido povos esti alprenata nur post

- interkonsiliĝo kaj konsento de la membroj de la Montpellier-a Grupo. Grupanoj de Béziers sin proponis por kunhelpi.
- konsento de la direktoro de "Centre Familial du Lazaret" kaj de U.E.F.. S-ro Llech-Walter interrilatos kun ambaŭ.

La federacia kongreso povus okazi en MENDE la 3-an kaj 4-an de majo 1980.

S-ino Volpelière raportis pri la efika kaj brila E - tago kiu okazis la 12-an de Aŭgusto en la kadro de la studperiodo de la "Instituto pri Mondanistaj Studoj" en La Lambertie, je 3 km de Ste Foy la Grande, apud Bordozo. Matene prelegis D-ro Albault el Tuluzo pri " ĉu monda kulturo estas ebla ? ". Posttagmeze kunvenis 16 esperantistoj el 3 departmentoj ( Gers,Gironde,Dordogne) pri Mondanismo. Guy Marchand, iniciatinto d de tiu Instituto partoprenis en la Lucerna Universala Kongreso kaj salutis dum la inaŭgura kunveno.

Gratulojn al niaj geamikoj Volpelière pro ilia bonega agado en la Mondanismo.

Pri agado de la grupoj, raportis :

NÎMES : S-inoj Mounier kaj Volpelière

Ĉijare estis 13 gelernantoj el 4 niveloj kaj,je la rekomenciĝo de la kursoj, oni esperas kelkajn junulojn? Ĉiusemajna paroliga kunveno.

La grupo organizos unusemajnan ekspozicion en la centrurba salonego Jules Salles, ekde la 6-a de oktobro.

S-ino Volpelière krome daŭrigas sian agadon ĉe "la Maison de l'Europe".

BEZIERS : S-ino Authier

Espero de inaŭguro de Zamenho-Strato je fiksota dato.

Aktivigo de esperantistoj en la sino de "Office biterrois d'Animation Culturelle".

PÈRPIGNAN : - Esperantista Kulturcentro - S-ro Llech-Walter -

Serio da artikoloj en la gazetaro pri "Esperanto kaj Botaniko" vekis interes son ĉe neesperantistoj.

Vizito de japana studento.

Okazis 3 kursoj. Ĉiumonata paroliga kunveno de membroj de la du ekzistantaj grupoj en Perpignan.

- U.S.C.M. ESPERANTO - S-ro Amouroux

La 6-an kaj 7-an de oktobro ekspozicio ĉe la kvartala junulardomo.

Espero de malfermo de 4 kursoj ( 2 por plenkreskuloj kaj 2 por infanoj), ĉe la kvartala lernejo.

La kvartala urba biblioteko aĉetis kvanton da E - libroj je la dispono de la publiko. La bibliotekistino lernas esperanton.

A L E S : S-ro Raynaud

La grupo dormetas. 2-3 esperantistoj partoprenas en la ĉiumonata kunveno

MONTPELLIER : S-ino d'Urbal kaj D-ino Vierne

Esperanto-agado en la sino de la "universitato de la tria aĝo".

Ekspozicio en Castelnau ( S-ro Diez) kaj ĉe "Centre de Documentation pédagogique" ( S-ro Lentaigne).

La grupo regule kunvenas kaj akceptas ekaterlandanojn por prelegturneoj (nuntempe estas atendataj Italoj).

S-ino Capus agadas ĉe la Liceo kaj gvidas kurson por gejunuloj. Ŝi krome rilatis kun Paul Guth kiu poste verkis artikolon favoran al esperanto.

En aŭgusto D-ino Vierne estis petata prelegi pri "Vivo kaj Komunikado" ĉe kongreso de " Association médico-sociale protestante de langue française".Ŝi krome estis petata aranĝi informejon pri esperanto ĉe "Larzac".

MENDE : S-ro Hénin

2 kursoj. Malgraŭ la foriro de tre kapablaj kaj agemaj esperantistoj al Aurillac (Ges-roj Celiqua) kaj Alès (nova sango por la loka grupo...) esperoj por la estonto ĉefe pro atendata efiko de la venontjara federacia kongreso se ni estos sufiĉe multnombraj. Jam de nun ni povas lanĉi alvokon por ke ni estu plej multnombraj kiel eble en Mende, la 3-an kaj 4-an de majo 1980.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

D-ino Vierne raportis pri la dumsomera renkontiĝo organizita en Narbonne-Plage de la " Société Toulousaine pour l'Esperanto" kaj legis inviton de la sama societo por ekskurso en Montmaurin, apud Carcassonne, la 14-an de oktobre.

........./..........

# KRUCVORTOJ

## Horizontale *

1 - Li sin esprimas nur per gestoj
2 - Partizano de absoluta individua libereco (R)
Inverse: posesivo
3 - Senvostulo — Participa sufikso
Granda telero el kiu oni ne manĝas (R)
4 - Prepozicio — Tiu de la jaroj kurbiĝas (R)
Respekta titolo donita al pastro
5 - Antaŭ vagonaro
6 - Granda — Eŭropa lando (R) — En salo
7 - Ili estas formitaj de kuniĝo de fungoj kun algoj — Ĉiu klopodu en la sia, tiam al la urbo mankos nenio (R)
8 - Vojo en ĝardeno (R) - Artikolo — Multekosta (R)
9 - Iomete da io abstrakta (R) — Fonetike: centro — 500 folioj da papero.
10 - Ĝi ne timas froston — Trinkaĵo (R)
11 - Membro — Iri kun iu.
12 - Mezuro de longo (R) - Pli ol sufiĉe
Mordeti per malgrandaj pecetoj.

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | | ■ | | | |
| 3 | | | | | ■ | | | ■ | | | | |
| 4 | | | ■ | | | | ■ | | | | | |
| 5 | | | | | | | | | | | ■ | ■ |
| 6 | | | | ■ | | | | | | ■ | | |
| 7 | | | | | | | | ■ | | | | |
| 8 | | ■ | | | | ■ | | | ■ | | | |
| 9 | | | | ■ | | | ■ | | | | | |
| 10 | | ■ | | | | | | | ■ | | | ■ |
| 11 | | | | ■ | | | | | | | | |
| 12 | | | | | ■ | | | | ■ | | | |

R. Raymaud (1979)

## Vertikale *

1 — Ĝenerala nomo por kvadrato - rektangulo - lozango (R)
2 — Parta simileco de malsamspecaj objektoj (R) — Negacio
3 — Malgrandegulo (R) — Genro de papagoj.
4 — Metaforo — Prepozicio.
5 — Nombro — Distingi da pro sia altkvaliteco
6 — Simbolo de fidela neforgeso — Laŭte paroli vortojn skribotajn de iu alia (R)
7 — Sufikso — Eltranĉi (R) — Pli ol okulo ĝi taksas belecon (R)
8 — Trovu ilin en motoro — Ĝi estas fonto de elektra energio (R)
Delikata kaj agrabla odoro.
9 — Tegaĵo el ŝtono, ligno, asfalto (R)
10 — Per ĝi oni povas transpasi rivereton — Meti sin en vertikalan pozicion (R)
11 — Kapvesto de papo (R) — Virseksa organo de la floro.
12 — Akvoŝvelo — Antikva horda muzikilo — Sufikso.

✱ — (R) nur radiko

✱ — Solvo de la antaŭa problemo

Solvo de la krucvortoj aperinta sur la № 70

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | K | O | M | P | A | N | A | N | T | A | R |
| M | A | L | A | L | T | I | G | I | ■ | G | E |
| P | R | I | M | O | L | ■ | R | O | D | A | N |
| L | A | V | ■ | R | A | B | O | B | I | R | D |
| I | V | ■ | S | E | S | O | P | A | ■ | I | E |
| F | E | L | ■ | G | O | B | I | ■ | A | K | V |
| I | L | I | R | I | ■ | E | R | I | K | ■ | U |
| K | O | M | O | ■ | A | N | O | N | I | M | E |
| A | ■ | O | M | B | R | O | ■ | ■ | R | A | J |
| T | U | N | E | L | O | ■ | L | A | ■ | S | O |
| O | R | A | ■ | U | M | B | I | L | I | K | ■ |
| R | A | D | I | O | ■ | P | A | T | R | I | N |


# 5 minutoj de paùzo




*Profesoro, memoru ke ni devas nur interesiĝi pri antikvaĵojn.*



*Ne plu rakontu ke vi fariĝos pastro.*



*Mi kunportas ofte mian filon, li havas vermojn.*




*SEN VORTOJ*



*Kompreneble vi forgesis mian fiŝhokon !*



*Por tagmeze mi preparis bongustan fumantan roston.*

......./.......

Komisiita de nia kongreso en Montpellier ("Sudfrancia Stelo" nº 71), S-ino Volpelière sin turnis al Pèro Waringhien kaj ricevis la jenajn respondojn :

- " Rusiljono" kaj " Langvedoko" oni tiel skribu.
- pro troaj eldonkostoj kaj limigita merkato ne eblas aperigi suplementojn al la franca-esperanta vortaro.

S-ro Llech-Walter mendis 500 ekzemplerojn de la nova broŝuro de U.F.E.:"Une approche de la langue internationale" kaj pretas ilin disvendi je la kostoprezo ( 2,5o + poŝtelspezoj).

S-ro Hénin rekomendis diskonigon kaj aĉeton de du interesaj kaj ĵus aperintaj libroj : E - bildlernolibro, de la oksforda universitato kaj " Asteriks la Gaŭlo" eldonita en Paderborn.

Je la 16-a finiĝis la dua parto de nia aŭtuna federacia laborkunsido.

J. AMOUROUX

# FINANCA RAPORTETO

En la lasta numero ni indikis la enhavon de la Federacio je la 1/4/78 kaj je la 1/4/79 kaj aperis profito de 10,12 Fr.

Oni devas aldoni ke ni sendis,dum tiu periodo,al U.F.E.,por diversaj fondusoj, la sumon de 500 Fr.

Ni vendis nur por 60 Fr da afiŝetoj ; restas stoketo kaj mi alvokas la grupojn kaj izolulojn por uzi tiun modernan propagandilon precipe nur dum la malfermo de la kursoj. ( prezo : po = 0,30 )

Restas ankaŭ kelkaj poŝtkartoj kun portreto kaj aŭtografo de Dr Zamenhof ( po : 0,60 ).

Ni helpis la kreadon de la nova grupo en Argelès / Mer post la prelego de nia prezidanto,per sendo de propagandiloj (fakturo de U.F.E. : 61,50 Fr).

Helpu finance nian federacion por la daŭrigo de nia agado.

L. NEGRON



# LA ERAROJ DE.... LA ALIAJ !

" Ĉiu montru al mi la erarojn,kiujn li trovis en ĝi " Z. en O.V.p. 24

" Mi gratulas vin pro via grava atentigo kaj korektado de miaj eraroj" . G. Waringhien al la japana akademiano Nakamura ( Oomoto)

". Mi ĉiam havis profiton,kiam oni rimarkigis al mi miajn erarojn (R.Bernard)

" Sendante al ni viajn rimarkojn, vi grave helpos nin por altigi la nivelon de la revuo.(Nuntempa Bulgario)

" Liberiĝi el sia nacia lingvo estas unu el la plej malfacilaj aferoj.(Esp. Mozaiko,p.8)

Konsili lernantojn estas facile. Multe pli tikla afero estas ATENTIGI malnovajn esperantistojn pri iliaj "probablaj" aŭ "certaj" eraroj. Tamen, ĉiu scias,ke eĉ la plej lertaj povas erari.

Se neniu kuraĝas atentigi VIN,MIN,NIN...pri gramatikaj eraroj aŭ ĉefe pri "...ismoj" (hungarismoj,francismoj...),kiel eviti ilin estontece ? Kaj kiel progresi ?

Estas ja konate,ke "Kritiki estas facile,fari malfacile "

ke "Nur tiu ne eraras,kiu neniam ion faras"

sed ankaŭ , ke "En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia trabon ne vidas

Pro tio,jen mia vidpunkto :

1) Koncerne min,mi komprenebla EGE DANKAS al tiu,kiu atentigas min pri miaj eraroj

2) Koncerne la aliajn,mi opinias,ke mia DEVO estas atentigi ilin pri kio ŜOKAS min. (kio signifas,ke mi eble ne estas absolute certa,ĉu mia rimarko estas ĝusta).

Kara korespondanto,se vi samopinias,kiel mi,mi estas certa,ke vi ne ofendi ĝos kaj mi dankas por via atento. Bonvolu diri al mi,ĉu vi konsentas pri miaj rimarkoj.

LENTAIGNE , 3,Av. de la Gaillargue ,34000
MONTPELLIER Francio

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# GRAVA EKSPOZICIO en NIMES

Ĝi okazis dum naŭ tagoj de la sabato 6-a ĝis la dimanĉo 14-a de oktobre . La ekspozicio tre bone lokita en granda salono : Galerie Jules Salles, sur unu el ĉefaj bulvardoj de nia urbo.

Al la materialo de nia amiko Lentaigne, ni aldonis afiŝojn pri diversaj U.K. panelojn pri turismo,filatelio, kaj tekstojn pri diversaj temoj. Ankaŭ , la Asocio R.I. D.E.F. ( Relations Internationales des Educateurs Freinet) havis specialan lokon, kie ĝi montris kelkajn el siaj efektivigoj ĉefe la utiligon de esperanto en siaj internaciaj rilatoj.

La oficiala inaŭguro okazis la sabaton 6-an je la 18-a. S-ro Jourdan,Deputito Urbestro de Nîmes,malhelpite komisiis unu el la vicurbestroj por lin reprezenti, kaj ĉeestis ankaŭ du aliaj vicurbestroj.

Pro la ofta malbela vetero,ĉisemajnon, la vizitantoj estis malpli multaj ol dum la antaŭa ekspozicio en 1976. Tamen 820 personoj eniris la salonon.

Sed la ĉefa afero,nepre substrekinda, estas la intereso, kiun montris multe da ili, kiuj post detala kaj longa pririgardo de la kofroj kaj paneloj, petis informojn pri la lingvo kaj pri la maniero lerni ĝin.

Dudek aĉetis lernolibron por komenci lerni de si mem, 25 enskribis sian adreson por ricevi informon pri la tago kaj horo de la kursoj.

Iom kurioza estas la fakto ke, krome, ni devis doni adresojn de delegitoj,ne nur en aliaj francaj urboj (Montpellier,Alès,Arles,Marseille,Paris,Strasburgo,Kolmaro, k.t.p.), sed ankaŭ al alilandanoj kiuj ne sciis la ekziston de grupo en sia urbo (Danoj, Nederlandanoj,Germanoj,Hispanoj,Italoj,Kanadanoj,Meksikano,Marokanoj,k.t.p.). Krome , pluraj notis adresojn por perkoresponda kurso.

Kompreneble, ni ne estas naivuloj kaj ni ne iluziiĝas. Ni ja scias, ke multaj el ili ne plenumos sian intencon, tamen ili almenaŭ estos aŭdintaj pri Esperanto.

Konklude, ni opinias ke nia laborado kaj laciĝo ne estis perditaj. La ekspozicio atingis sian celon kaj certe helpos por la disvastigo de nia lingvo.

Invitita de S-ro P. Lesage, priangla instruisto en Liceo A. Daudet, Renée Volpelière povis iri por klarigi kio estas esperanto :

1-e Al du klasoj de geliceanoj ( la dua kaj la unua) ;
2-e al gejunuloj diverslandaj, membroj de la Maison de l'Europe.

La unua informiĝo ebligis starigi en la Liceo A. Daudet kurson por 6 gelernantoj.

Entute, enskribiĝis en kursoj por komencantoj 14 personoj. Ĉu ili estos persistemaj ? Tion ni vidos poste.....

Renée VOLPELIERE

# LA ERAROJ DE.... LA ALIAJ !

AMI kaj ŜATI : En Plena Ilustrita Vortaro : "oni amas ĉion,kio plaĉas al la spirito, koro aŭ sensoj ; oni ŝatas tion, kies valoron oni opinias granda. "Amu domon novan ..." kaj amikon malnovan.(Z). Ami kafon. Ami kuirejon (Z),honoron (Z), laboron (Z). Ami danci,(Z) fanfaroni"(Z) preni (Z) redoni (Z)

---

Komenci, fini laboron ; do : la laboro komenciĝas,finiĝas .
La bruo ĉesas, la ĉevalo haltas ; do : mi ĉesigas la bruon , mihaltigas la ...on
Transitivaj estas : komenci , fini .
Netransitivaj estas : ĉesi , halti .

( Fino de la artikolo de K-do LENTAIGNE )

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 3me Trimestre 1979

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes